

Eltira o el „Informilo por Interlingvistoj”, n-ro 84-85 (2013)

Terminologia laboro de UEA

4.3 Spertaj profesiuloj pri lingvoj partoprenu normigan laboron

Mélanie Maradan – komisiito de UEA

Fine de junio 2012 en Madrid (Hispanio) okazis kunsido de tutmonda teknika komitato pri terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj rimedoj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) kiel kunlaboranta organiza o estis invitita aktive partopreni.

Kio estas normigado?

Normigado estas la ellaboro de teknikaj normoj. t. e. formalaj dokumentoj, kiuj priskribas ekzemple objekton a procezon. Teknikaj normoj verki as kadre de organiza oj, kaj ne laste de normigaj organiza oj. Teknika normo kiu aperas kadre de normigaj organiza oj estas la rezulto de interkonsento inter spertuloj de la rilata kampo. Post publikado, i povas esti uzita ekzemple la vole fare de privataj firmaoj (kutima ekzemplo estas ISO 9001 pri kvalito) a la le e decide de registaroj a similaj instancoj. Normigada laboro povas okazi je pluraj gradoj: regione, lande, kontinente a intemacie.

Kial normigi?

Normigi permesas interkonsenti. Normigi en la kampo de fervojoj, ekzemple, permesas ke trajnoj veturu de unu lando al alia senprobleme, sen ke la relo-grandeco an i u kaj ka zu praktikajn problemojn. Normigi permesas al sciencistoj interkomuniki, ekzemple pro kuna decido pri unuoj-sistemo: metro, kilogramo, sekundo, ampero, kelvino... Teknika normigado okazas en la plej diversaj kampoj. kaj inkluzivas lingvojn. Aa (afara), ab (ab aza), af (afrikansa), ak (akana), am (amhara), ar (araba), as (asama), ay (ajmara)... Lingvokodoj, ekzemple, estas normigendaj kaj normigataj. Normiga produkto en finpreta formo iam estas kolektiva akordo inter ne plene samopiniaj partioj. Por ke i estu utila, necesas ke plejmulto da vidpunktoj estu esprimitaj. Planlingvoj anka estas lingvoj, sekve anka planlingvanoj reprezentas esprimindan vidpunkton.

Kiu normigada laboro okazas internacie rilate al lingvoj?

Ekzistas pluraj grupoj, kiuj pritraktas normigadon de lingvaj aspektoj. Grava instanco estas la teknika komitato de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kiu okupiĝas pri diversaj temoj rilate al lingvoj, efike terminologio, sed ankaŭ interalie tradukado kaj interpretado. Tiu teknika komitato (formale nomita ISO/TC 37) konsistas el dudeko da laborgrupoj, kiuj siaflanke okupiĝas pri konkretaj projektoj. Rimarkindas, ke la laboro plej ofte okazas en la angla, kvankam la rusa kaj la franca same estas laborlingvoj de ISO.

Kiel partopreni en normiga projekto?

UEA kiel kunlaboranta organizaĵo rajtas nomumi spertulojn en iu ajn el la laborgrupoj de ISO/TC 37. Tio volas diri, ke esperantlingva lingvisto povas anonci sin tiukadre por iu ekzistanta projekto kiu interesas lin. Partopreni en normiga projekto tute ne signifas prizorgi la rilatojn de UEA aŭ fari administradan laboron. Pri tiaj aspektoj okupiĝas UEA mem, pere de komisiito. Partopreni en normiga projekto sekve signifas esti nomumita spertulo en iu laborgrupo (nur en tiu laborgrupo), kaj fakte kontribui al iu normiga projekto (projekto de normo), partoprenante kunsidojn de la laborgrupo (surloke aŭ perinterrete), kontribuante al eventuala retlisto kaj komentante malnetojn de la normiga produkto. Menciindas, ke ankaŭ UEA rajtas proponi novan normigan projekton. Tio, tamen, poste postulas konvinkadon de 10 ISO-membrolandoj pri la indeco de la pria temo. Verŝajne estas ĉi nun nepritrakitaj temoj, pri kiuj esperantolingvanoj povus inter alii ri ajn spertojn kaj grave kontribui, ekzemple je la uzo de pontolingvo en tradukadoj homa aŭ maŝina. Ideoj tiukaze ĉiam bonvenas, kaj konkretajn proponojn oni povas prezenti al la komitato.

Kio konkrete okazas nuntempe?

Jen kelkaj praktikaj ekzemploj:

Ekzistantaj laborgrupoj: laborprincipoj de la terminologia fako, harmoniigado de terminologioj, tradukado, interpretado, ontologioj, datuminterŝanĝoj, administrado de datumbazo, reprezentado de plurlingvaj informoj, lingvokodoj, leksikografio, terminografio... Ekzemploj de projektoj nuntempaj:

- ĝeneraj gvidlinioj pri tradukoprojektoj²
- Interpretado - gvidlinioj pri "komunumo-interpretado" (community interpreting)
- Interkongruenco kaj interuzeblo de ontologioj³

2 UEA sendis komenton pri aperinta malneto de la projekto.

3 UEA nomumis spertulon por tiu projekto.

4401 sciencaj kaj fakaj verkoj en Esperanto

Por ricevi sian universitatan diplomon studentoj en Hungario devas fari ekzamenon ankaŭ pri iu fremda lingvo. En baza, bakalara nivelo en multaj universitatoj ankaŭ Esperanto estas akceptata, sed en mastera grado (mSc) - la pasintjara leŭo - oni akceptas nur tiujn lingvojn, en kiuj pruveble ekzistas scienca kaj faka literaturo. Por helpi la studentojn de la koncernaj fakoj en la Esperanto-Centro Eventoj ni kompilis libro-liston pri fakaj verkoj kaj sciencaj libroj eldonitaj aŭ aperintaj en Esperanto - nekonsidere ilian nunan aŭ esteblon.

Nia listo enhavas 4401 elementojn de la sekvaj fontoj:

- iuj materialoj de STEB (Scienca kaj Teknika E-Biblioteko) ĉe www.eventoj.hu;
- libroj en la libroservo de UEA en kategorio scienco kaj tekniko;
- libroj kun scienca kaj teknika enhavo en la katalogo de Kolekta o Fajsz;
- artikoloj el Scienca Revuo en retejo ĉe Eventoj;
- artikoloj el la scienca revuo Teleskopo;
- artikoloj el Jura Revuo;
- listo pri aperintaj vortaroj en la retejo de UEA;
- enhavo de la verko "Fakverkoj" de Miroslav Malovec;
- librolisto en broŝuro de Rátkai Árpád pri faka aplikado ktp.

Ni konscias, ke la listo tute ne estas kompleta, nia celo estis nur helpi la juran agnoskon de Esperanto en hungariaj universitatoj.

La kolekta o estas atingebla ĉe la adreso: <http://www.eventoj.hu/sciencverkoj/>

La nuna fazo (aŭtuno 2012) estas rezulto de plurmonata laboro. Se iu volas daŭrigi kaj plikompleti la materialon, volonte ni transdonas la fontan xls-dosieron. Vi povas reagi, kaj aldoni vian komenton en nia nova retpaĝo ĉe: <http://www.facebook.com/Ret.Info> Ni ŝojas, se ni povis iom helpi al la prestiĝo de Esperanto.

La kompilintoj: Szilvasi László kaj Mészáros István